

# LA VERDA LUPEO

25ajaro



15(94) INFORMILO DE ELF-AREK Septembro 93

Offizielles Organ der ArGe ESPERANTO im BdPh eV








TUT-PK de la Fila-ekspo 1993 en Helsinki (SF). La bildo montras la "Laboristan Kongresdomon". Tiu domo estis la kongresejo de la 14a UK 1922 kaj de la 31a SAT-kongreso 1958.









GM de la 14a UK kaj de la 31a SAT-kongreso 1958

Stampoj de tiuj kongresoj.







E. N. Setälä.

La fama finna Esperantisto E. N. Setälä (1864 - 1964) faris prelegojn dum la kongresoj.



# NI PRI NI

25 jaroj ELF-AREK

El la letero de nia klubmembro Germano Gimelli:
"...emocie mi legis la jubilean artikolon. Kiel frata amiko de Jensen, Chapellier, De Salvo, Sonderegger kaj de preskaŭ ĉiuj aliaj fondintoj de ELF-AREK mi vere partoprenis persone en tiu listo pere de ili. Sonderegger transprenis ĝis sia morto, laŭ mia scio, la plej imponan kaj kompletan glumark-kolekton de Jensen. Nun posedas ĝin Richard Wluka, kiu ankaŭ disponas pri impona glm-kolekto.

# NIAJ MORTINTOJ

Ni funebras


Odon HORAK, nia kluba amiko de multaj jaroj, forpasis dum februaro 1993 en la aĝo de 92 jaroj. Ni kondolencas al la familio MERVARTOVA,

Johano Szilagyi, pasia kaj aktiva E-filatelisto, forpasis la 18an de aprilo. Ni sincere kondolencas al la familianoj.

## adresŝanĝo...

Stefan Bielak: Nova nomo de la strato: ul. ks.P, Wawrzyniaka 24 m. 19.

# CETERAĴOJ


Honorigo de nia kluba membro Richard Hirsch

Dum la Germana-Ĉeña-E-Kongreso, pentekoste en Karlovy Vary,li estis nomita "Honora Membro" de la Germana E-Asocio.Dum la 78a Universala Kongreso en Valencio (E) li estis nomita "Honora Membro" de UEA.

Hirsch aŭtodidakte lernis la lingvon 1948 kaj tuj aliĝis al la loka, landa kaj internacia E-movado. La lokan E-grupon li gvidis de 1953 ĝis 1964,iĝis delegito de UEA en 1953, estris 1961 la LKK de la germana landa kongreso kune kun sia edzino.Li ankaŭ aktivis en la regiona movado. En 1973 li elektiĝis ĝenerala sekretario de Germana E-Asocio, por dum la sekvaj du jardekoj iĝi sinonimo de preskaŭ ĉiu administra kaj organiza laboroj por GEA. Li estis komitatano de UEA (1973 ĝis 1989) kaj volontule laboris por UEA (1977 ĝis 1985), kiel administranto de la Delegita Reto, prizorganto de Societo Zamenhof kaj de Fondaĵo Canuto. Hirsch estas jam depost 20 jaroj kotizperanto de UEA (lia edzino estas la ĉefdelegito). Li ankaŭ estas konata kiel E-filatelisto kaj li jam estas tra multaj jaroj membro de ELF-AREK. 1989 li eldonis, post pli ol 10 jara preparlaboro. la ampleksan katalogon de la E-filatelo, Ciujare li eldonas suplementojn por tiu katalogo. Kun kun mi, li 4-foje li 4-foje jareaperigas "La Verdan Lupeon". Li ankaŭ havas grandan kolekton de E-filatelaĵoj kaj glumarkoj. Intertempe li jam 25-foje montris sian ekspozaĵon pri la E-filatelo en naciaj ekspozicioj. Unufoje ankaŭ en Aŭstrio. Per sia glumarkkolekto li jam 4-foje gajnis orajn medalojn.

Menciindas ankoraŭ lia kunlaboro por eldoni la "Germanan Antologion" (1985) kaj la "Esperanto-Bildvortaron" (1986). En 1986 Hirsch ricevis la

meritmedalon de la ŝtata meritkruco pro sia pli ol 40-jara laboro "por la popola interkomprenîĝo pere de Esperanto".

Gratulojn al li!! la redaktoro

# NI EN EKSPOZICIOJ

*Sukceso de nia klubamiko Hirsch*

Dum majo 1993 Hirsch partoprenis en la *COPHILA* en Coburg(D) per sia ekspozaĵo de glumarkoj kaj akiris jam la kvaran oran medalon. Gratulojn!

*Konsiloj por novaj ekspozantoj*

En la finna gazeto *"La Motivfilatelisto 2/93"* troviĝas bona propono. Nia A.G. Strönne tradukis la svedlingvan artikolon de M. Bergmann: "...Novaj aŭ nespertaj filatelistoj devus serĉi por si *"Filatelan Patronon"*; ekz. inter sialandaj juĝkompetentaj filatelistoj. Tiu devus helpi en la plibonigo de la kolektaĵo. La kontaktoj povus okazi pere de leteroj kun fotokopioj kaj personaj kontaktoj. Eĉ bonaj ekspozantoj povus pere de tiu helpo eble akiri pli altnivelan medalon..."
Tio ideo certe ne estas nova kaj multlande oni tiel praktikas. En la iama GDR-a filatela movado ekzistis en ĉiu "provinco" speciala konsulta centro por nov-ekspozantoj. Spertaj ekspo-juĝistoj donis rekte konsilojn por plibonigo de la ekspozaĵo. Nia Piton en Brazilo ankaŭ praktikis tiun vojon de konsulto ĉe specialistoj. Mi memoras pri renkontiĝo antaŭ pli ol jardeko de E-filatelistoj en CS, kie nia Vana donis konsilojn ĉe ekspozaĵoj al la ekspozantoj. Nepre rekomendinde por novaj ekspozantoj estas serĉi kontakton al loka spertulo kaj ankaŭ: viziti altnivelan ekspozicion kaj tie surloke studi manieron de preparo de ekspozaĵo kun altrangaj medaloj. Krome certe ekzistas fila-literaturo naci-lingva pri ekspo-preparo. Nelaste ĉiu povas peti helpon ĉe niaj specialistoj, memkompreneble devus okazi rekompenco de la necesaj elspezoj.
*Rimarko de Hirsch:* Tiuj estas bonaj konsiloj, sed ili ne forigas la nescion de la juĝistoj pri la temo: *Esperanto.* Ekzemple ili tute ne konas la rarecon de la unuopaj E-stampoj.

*Ne-Esperantaj materialoj por niaj ekspozicioj*

Jam ofte ni skribis pri ne-Esperantaj materialoj por niaj eks-pozaĵoj. Hodiaŭ eblas prezenti al vi finnan "reklaman" pk-tutaĵon pri la *Laborista Domo* en Helsinki. En ĝi okazis la 14-a UK 1922 (prelegis tie la elstara finno Settälä (pm) kaj la 31a SAT-kongreso 1958 (E-sta). Eldonkvanto de tiu TUT 15 000! En novembro 1993 okazos tie FILATELIA 93, finna nacia fila-ekspo. Nia Österman trovis kaj sendis ĝin. Ŝi skribis, ke por la finna E-movado ĝi estas elstara filatela dokumento. Ni gratulas pro la trovo kaj kore dankas pro la alsendo. (vd. titolpaĝo)

# NI EN ALIAJ GAZETOJ

*Jean Amouroux en* LA PHILATELIE FRANCAISE

De oktobro 1978 ĝis januaro 1991 kun ĉiam la sama rubrika titolo "ESPERANTO ET PHILATELIE" (Esperanto kaj Filatelo)aperis entute 64 sinsekvaj artikoloj el la plumo de Amouroux.
Nova redakcio decidis pri ŝanĝiĝoj:

- ne plu estos kronikoj, sed ĉiu artikolo havos sian propran titolon
- la ilustraĵoj estos naturkoloraj

Sekve aperis artikoloj:

- aŭgusto 1991: Libera respondo kaj Esperanto
- marto 1992: Klara Lingvo
- aŭgusto 1992: Internacia Monunuo
- januaro 1993: Iu pli peza ol aero
- aprilo 1993: De buŝo al orelo
- junio 1993: Stampo diversaspekta

Per tiu ĉi modela informado pri E en ekstermovada faka ĵurnalo, legata de eble ĉiuj francaj filatelistoj, nia Amouroux disvastigas scion pri E tra la franclingvaj landoj kontinue kaj trans jardekoj. Gratulon! Ni ĝojas pri via aktiveco, kiu ja tute ne limiĝas al nia E-filatelio. Dankon pro viaj leteroj kaj informoj!

JIANGXI-A FILATELO

En sia numero 105, marto 1993, tiu regiona ĉina fila-informilo raportas pri nia *La Verda Lupeo* kaj montras reproduktaĵon de LVL-artikolo pri la fila-ekspo en Nanchang.
Sendis: Cao Xionglin. Dankon al vi! Same pro la senditaj materialoj.

# INFORMO

*Pola Radio - Redakcio Esperanto*

Por dokumenti la elsendojn de Radio Pola uzeblas la nova afrankstampo de tiu radio-stacio. Certe vi scias, ke oni tie ĉiutage sendas en E. Program-informilojn vi ricevas (senpage) ĉe:
*"Pola Radio, Esperanto-redakcio, skr.poczt. 46, PL-00 950 Warszawa (Pollando).* Kompreneble vi trovos la afrankstampon sur la koverto! La E-redaktoroj eĉ ĝojos pri via letero! Bonvolu skribi al ili. Vi per tio kontribuas al la plua ekzisto de tiu por nia E-movado grava radio-stacio.



# INTERŜANĜO

Kolektanto de uzitaj tutmondaj poŝtmarkoj kaj kolekt-komencanto de E-filatelaĵoj kaj E-glumarkoj serĉas interŝanĝkontaktojn:
*Franĉjo Robles, Jardines 22, 1°, D, E-18002 Granada, Hispanujo*

# STAMPOJ

STAMPOJ

BG ??? SAT-Kongreso en Kazanlak (BG)

Hans Jankowski bonvolis sendi al mi salutkarton el tiu kongreso. Sur ĝi mi trovis nebulozan stampon, absolute ne legeblan, ŝajne kun teksto pri la SAT-Kongreso. Sed pri tia stampo ne estis informo en la salutkarto. Tamen, mi ankaŭ trovis la subskribojn de niaj ELF-AREK-anoj: Ivan Peev, Vulfoviĉ, Hasala kaj Jankowski. Dankon. Ankaŭ nia prezidanto Ivar Paulsson ricevis pk kun tiu nebuloza stampo.

Nova TĴ 22 L el Haikou

Samideano Hou Ling Xiong afablis, sendi vicon da E-stampoj al nia ĈKĜ. Inter ili ĈKĜo trovis ankaŭ variaĵon el TJ 22 (ET), uzitan en Haikou. Tiu sta trovos lokon en nia stampo-katalogo sub la numero TJ 22 L. (Pasintnumere ni informis pri la novaj TJ 22 el Shaoguan kaj Zhuhai). Dankon pro la informo al ambaŭ niaj ĉinaj amikoj.

TJ 1992 - 44 (NET) Liu Bocheng (Haikou) 海口




Haikou 1992 dec 04. Teksto en E: LA 100 JAROJ DE LA NASKIGO DE LIU BOCHENG. Desegnis: Zhang Lin Rui. Uzita de PK Haikou.
Klarigo: Bocheng estis eminenta ĉina generalo. Aperis samtage du poŝtmarkoj pri li. Informoj de ĈKĜ.

Aperis du nekonataj ĉinaj sta el 1992

El la jara listo de ĉinaj sta 1992 ni forstrekis pro nepoŝteco 2 sta: TJ 1992-8 el Ninghai kaj TJ 1992-17 el Haikou. Nun antaŭ mi kuŝas 2 sta ricevitaj pere de ĈKĜ el Haikou pri kiuj mankas ĝis nun informoj. Ili ja povus okupi la vakajn numerojn 8 kaj 17 el 1992, sed tio konfuzigus certe iujn uzantojn de tiu numera sistemo. Ankaŭ ekestos malfacilaĵoj ĉe la katalogado, ĉar Ĉinio ja estas ekde 1993 partigita en E-temaj(ET) stampoj kaj ne-E-temaj (NET) stampoj. Tial ili okupos lokon en la fino de la jara listo. Tiu povas validi por la kuranta listigado, sed ne por la katalogado. Tiuj du stampoj havas pli fruan daton. Tial ni devas envicigi ilin kaj en la parto NET ŝanĝos la katalognumerojn ekde numero 117. La suplemento 1994 enhavos tiujn ŝanĝojn.

TJ 1992-45 (NET) La abio (Haikou)




Haikou 1992 mar 10. Teksto: LA ABIO. Bildo: abio.
Supozeble desegnis: ZLR kaj supozeble uzita de PK Haikou.
Verŝajne "forgesita" stampo.

TJ 1992 - 46 (NET) Literatura Kunsido Yan-An (Haikou)

mankas bildo

Haikou 1992 maj 23. Teksto en E: LA 50 J. DE PUBLIKIGO DE PAROLADOJ ĈE LITERATUR-ARTA KUNSIDO EN YAN-AN. Bildo: monto kun fama pagodo sur ĝi. Mankas informoj pri tiuj du stampoj.
Koran dankon al nia ĈKĜ, kies aktiva E-filatela esplorado heligas por ni la E-filatelon en PR Ĉinio.
Bonvolu, kara ĈKĜ, sendu afablajn salutojn kaj nian koran dankon al samideano Hou Lin Xong pro liaj valoraj sciigoj!

TJ 1993 - 10 (NET) Popola Kongreso (Haikou) 海口





Haikou 1993 mar 15. Teksto en E: LA 8-A TUTLANDA POPOLA KONGRESO DE PR ĈINIO.
Bildo: Mapo pri Ĉinio kun emblemo.
Desegnis: Zhang Lin Rui.
Samtage aperis poŝtmarkoj pri tiu evento.
Informis: Ĉin Kajĝi.
Uzita de PK Haikou.

TJ 1993 - 11 (NET) Popola Kongreso (Lanzhou) 兰州




Lanzhou 1993.3.15. Teksto en E: LA 8-A TUTLANDA POPOLA KONGRESO DE PR ĈINIO.
Bildo en la sta: La Popola Halo en Pekino/Beijing.
Desegnis: Guo Jinquan. Uzita de PK Lanzhou.


TJ 1993 - 12 (NET) La Goo (Haikou) 海口



Goo (ĉine: Weiqi)estas ĉina bretludo kaj devenas el antikvaj ĉinaj tempoj. Dum la lastaj jardekoj tiu bretludo populariĝis en multaj landoj kaj disvastiĝis tra la tuta mondo (ekzistas ankaŭ: Esperantista Go-Ligo Internacia (EGLI)).

La 30an de aprilo 1993 aperis serio de du pm (1993-5) kun nominaloj de 20 kaj 160 fenoj kun motivoj pri la Goo-ludo.La Haikou-a Poŝtmark-Kompanio (PK) uzis en tiu tago unua-tagan stampon kun la E-teksto: LA GOO. Desegnis: Zhang Lin Rui. Info de ĈKĜ.

TJ 1993 -13 (NET) Goo (Nanchang)




Samtage uzita de PK Nanchang kun la E-vorto: "Goo". Informis kaj sendis: Cao Xionglin. Dankon! Mi jam respondis al vi. Volonte mi partoprenus en la sekvontjara via-urba ekspo, se atingus min baldaŭ konkretaj informoj kaj oficiala invito de PK.

TJ 1993 - 14 Go-ludo (Qingdao


Samtage uzita de PK Qingdao. E-teksto: "GO-LUDO". Informis kaj sendis sur "B-F.D.C." nia Gao Zhenxing. Dankon!
Kion signifas la "B" antaŭ "FDC"?
Bildo: Ĝuste afrankita UTK, poŝte sendita de Ĉinio al Germanio,

首日封 B-F.D.C.

R Burmeister
M. Müllerstr. 62.
D-O-9051 Chemnitz
Deutschland <Germany>



TJ 1993 - 15 (NET) Sportkunveno (Nanchang)



En Ŝanhajo okazis en majo 1993 la "Unua Orient-Aziaj Ludoj". Por tiu evento aperis serio de 2 pm kiel kunpresaĵo kun nominaloj de po 50 fenoj. (Serio 1993-6, eldontago: Majo, 9a 1993)
La PK de Nanchang en tiu tago uzis unuatagan stampon kun la teksto en E: "LA UNUA ORIENTA AZIA SPORTKUNVENO"
Sendis kaj informis: Cao Xionglin. Dankon!

TJ 1993 - 16 NET) Sportkunveno (Qingdao)

Samtage uzita unuataga sta (Majo, 9-a) de la PK de Qingdao kun la E-a teksto: "LA 1-A ORIENTA-AZIA SPORTKUNVENO".
Sendis kaj informis: Gao Zhenxing. Dankon al vi!
Bildo: UTK kun poŝta afranko por letero de Ĉinio al Japanujo.





TJ 1993 - 17 (NET) Patriotaj Demokratoj (Qingdao)




Qingdao 1993 majo 15. Teksto en E: ĈINAJ PATRIOTAJ DEMOKRATOJ".
Uzita de PK Qingdao.
Samtage aperis samtema pm-serio (1993-8) kun 4 portretaj pm.
Informis ĈKĜ,

TJ 1993 - 18 (NET) Bambuo (Qingdao)

Qingdao 1993 jun 15. Teksto en E: BAMBUO. Bildo: Bambuo. Uzita de PK Qingdao. Desegnis: Sun Ying.



Samtage aperis bambua pm-serio (1993-7) kun kvar pm. Informis: Gao Zhenxing.
Bildo: Poŝte afrankita UTK kun du bambuaj pm kaj pm pri la Popola Kongreso. Kvankam "landvoje" afrankita, tiu letero atingis min post ses tagoj, la 21-an de junio! Rekorda!!

<u>TJ 1993 - 19 (NET) Pekina Federacio de Soci-Sciencistaj Rondoj (Beijing)</u>




Beijing 1993.7.7. Teksto en E: LA 10-A FONDIĜ-DATREVENO DE FEDERACIO DE PEKINAJ SCIENCISTAJ RONDOJ.
Uzita de Pekina Xiqu-a Poŝtejo.
Desegnis Zhang Lin Rui.
Informis: ĈKĜ. Koran dankon!
La bildo en la stampo montras la konstruaĵon "La Altaro" en Pekino. La bildo konsistas el la du ĉinaj ideogramoj por BEI JING.

<u>TJ 1993 - 20 (ET) Samideanino Deng Yingchao (Beijing)</u> 北京

Beijing 1993.7.11. Teksto en E: LA UNUA MORT-DATREVENO DE SAMIDEANINO DEN YINGCHAO. Uzita de Pekina Xigqu-a PM-Kompanio. Desegnis: Xie Shaoxing kaj Tan Ailing (gesamideanoj). La bildo en la stampo montras portreton de Den Yingchao(laŭ foto el la jaro 1970). 5 steloj (por ĈPR) kaj vicon da pin-pingloj (por 88 vivo-jaroj)

S-ino Deng (1904.2.4. - 1992.7.11)lernis E-on en 1913 en Popolamasa Lernejo de Pekino. Kunfondinto de ĈPR. Pioniro de ĉina virina movado. Edzino de Zhou Enlai, elstara ĉina politikisto.





Nia altestimata samideano Bakin skribis al s-ino Xie Bingxin (kunfondintino de la Asocio "Amikoj de Esperanto") okaze de la morto de s-anino Deng: "La forpaso de Franjo Deng doloras ne nur vin, sed ankaŭ min. Ŝi estas homo bona kaj nobla. Ŝi havas nek heredaĵon, nek parencojn kaj nenion ŝi foren kunportis. Vere ŝi estis oferemulino. Modelo de mia eterna strebado, modelo malfacilege imitebla".

Sinceran dankon al nia ĉin Kajĝi pro la ampleksaj informoj pri ŝi.

I 50 Maŝinvarbstampo por la 45a IFEF-Kongreso

La poŝtoficejo de Cervia uzis de la 20-a de majo ĝis la 12-a de junio maŝinvarbstampon kun itala kaj E-a tekstoj pri la kongreso. Vidu la bildon. Informis: Gimelli.







Koran dankon ankaŭ al la gesamideanoj Elda Dörfler, Gimelli kaj Hirsch pro senditaj materialoj.

I 51 45-a IFEF - Kongreso en Cervia

Gimelli skribis: "...Dum la 45-a IFEF-Kongreso en Cervia oni uzis specialan stampon en la kongresejo nur la 9-an de junio 1993. La stampo montras la emblemon de IFEF kaj velojn sur la maro. LKK pretigis bildkartojn kaj kovertojn (entute 2500 ekz.)La bildkartoj kun la bildo de la glm ekzistas en dekmil ekz...."







H 127 Fervojista Renkontiĝo (Pecs 1)

Nia Fekete informis: "...Dum la 25-a Landa Fervojista E-Renkontiĝo en Pecs (prononcu: Peĉ)oni uzis tiun stampon dum la 3-a kaj 4-a de julio 1993. En la stampo videblas konstruaĵo nomata "ĝamao", konstruita laŭ ordono de paŝao Hasan en la mezo de la 16-a jarcento dum la turka okupado de Hungario. Malantaŭ la ĝamao videblas la minareto, 22,5 metrojn alta.




Sur dekoraj kovertoj kaj kartoj videblas la televida túro sur la monto Meĉek apud la urbo Pecs. Fama pro la Abaliget-aj IREN.

Korektu la lastajn hungarajn sta-numerojn

VEF 1992: H 125, ne 124: tiu numero jam ekzistas por la 25-a IREN.
1992: jubilea E-sta de 1918: H 126.
Sekve la nova E-sta el Pecs estas H 127.
Mi petas pardonon pro nia eraro. Ni dankas al Fekete, kiu atentigis pri la ne ĝusta numerigo.

E - 35 78-a UK en Valencio

Poŝtkartan saluton kun la E-a poŝtstampo mi ricevis de nia Hirsch de la 78-a UK. La sta tekstas en E: 78-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO kaj la datoj : 26-27 JULIO 1993. La stampo nur estis uzita dum tiuj 2 tagoj. La hispana poŝto ankaŭ ne akceptis pli poste stampi PK kaj kovertojn por filatelistoj. Strange!
Pri la ELF-AREK kunveno bv. legu sur paĝo 16.




LASTMINUTE...

I 52 63-a Itala kongreso de Esperanto

Pineto (Teramo) 27/8 - 4/9-1993. E-teksto: 63-A ITALA KONGRESO DE ESPERANTO. Temas pri maŝinvarbstampo. Detalaj informoj mankas. Koverto kun la unua-taga datstampo ricevita la 01 09 1993.







# AFRANKSTAMPOJ


12-a KONGRESO DE SEA

11-13.6. 1993 okazis en Bratislava la 12-a kongreso de Slovakia E-Asocio. El la ĉeĥa urbo Straźnice venis por tiu evento nova

afrankstampo.Vd. la bildon. Mankas informo pri la tempo de uzado. De la vorto "KONGRESO" estas en ĉiuj stampoj la unua "O" kaj la "G" nur parte legebla.








Nova "valora-parto" en la ĉeĥaj afrankmaŝinoj
La afrankmaŝinoj en Straźnice (Esperanto-Klubo) kaj en Praha (ĈEA) ricevis novajn "valorpartojn" kun la nova landnomo "Česká Republika". La unua dato, ĝis nun konata, kun la nova valorstampo estas: 01 07 1993. Kvankam ankaŭ la landa literkodo "CS" ŝanĝis al "CZ" la tp de Straznice portas ankoraŭ la eldmodiĝintan CS. Eta signo pri tumulta tempo, dum kiu kreskas novaj limoj en Eŭropo, kvankam ĉiuj homoj parolas pri forigo de landlimoj.








## E-POSTMARKOJ



Pri la brazila pm, eldonita okaze de la ORA JUBILEO DE ESPERANTO 1937

Tiu pm (Mi: 471, Yv:333) aperis en folioj kun 60 pm. Pri tio atentigas ankaŭ la meza talono CONTEM 60 SELOS (enhavo 60 markoj). En iu frua "Fenikso" nia Gert Drucker skribis pri tio. Kvankam ni ankoraŭ ne vidis kompletan folion, eblas konkludi, ke en folio havas lokon horizontale 7 kaj vertikale 9 markoj. En la meza (4a) vertikalo okupis lokon la talono trans tri "kampoj (lokoj)". En nia "Fenikso/LVL" ni jam montris la centran parton el tiu folio kun la talono, ĉirkaŭita ĉiuflanke de 12 pm. Ilin vi ankaŭ trovas en nia katalogo sur la paĝoj 8 kaj 8A, Posedas ilin nia Drucker en sia kolekto. Ankaŭ Piton sendis kopion de sia posedaĵo, foliparton kun 17 pm kaj talono. (bildon vd. paĝo 12).

Ankoraŭfoje pri la bavara talono

Jam en la antaŭa numero de LVL ni volis aperigi artikoleton pri la aspekto de la folio kun E-(varb)talono de la bavara pm (1911). Rekonstruon de la folio mi faris sur la bazo de kopioj pri posedaĵoj de niaj klubaj geamikoj. Plej grave estis la de nia Österman sendita kopio pri la vertikala "kvinstrio". Tiu ebligis rekonstruon de la supra parto kun 5 horizontaloj. Okazis, ke nia Österman nun kopiis ĝuste tiun supran folioparton komplete!! Hodiaŭ ni tiun kopion prezentas en sia tuto al vi. Se vi, per viaj posedaĵoj, iel ebligas kompletigi la suban parton, bonvolu skribi pri tio al mi. Sciu, ke eĉ germanaj specialkolektantoj ne


scias, kiel aspektas kompleta folio, ankaŭ ne la poŝtaj muzeoj en Germanio. Koran dankon al nia Terttu Österman pro la alsendo de la kopio. Eble vi skribos al mi, kie vi sukcesis fari tiun kopion.
(bildo vd. sur paĝo 13)




Blua, sendenta presprovaĵo sur kartono el la kolekto de nia Piton (BR).




PK pri s-ino Deng Jingchao



rivero Haihe ĉe la stacidomo Tianjin
(teksto vd. paĝo 14)




La fotokopio de la folio kun la bavara(varb-)talono de nia kolekt-amikino Tertu Österman (SF).

# FAMAJ ESPERANTISTOJ




*Jen alia filatelaĵo pri s-ino Den Yingchao*

Jes, temas pri ne-Esperanta materialo, sed nepre utiligebla por filatela dokumentado pri s-ino Deng (ekz. en filatela ekspozaĵo pri la historio de la Esperanto-movado en ĉinio.

La memoriga poŝtstampo portas ideogramojn signifantajn:

"Memorigo pri la disŝuto de cindroj de k-dino Deng Yingchao en la riveron Haihe ĉe Tianjin. La dato montras la tagon de la disŝuto, 1992.7.18. (ŝi mortis dekunuan de julio 1992).

La "tutaĵ-bildpoŝtkarto" el la serio YP 10. aperinta 1991 kun la "valorstampo" (surpresita pm) de 15 fenoj montras la riveron Haihe ĉe la Tianjin-a stacidomo. (vd. sur paĝo 12)




PK de M. Benka kun sia subskribo



bildo de d-ro Zamenhof el la PK de M. Benka

Pri Martin Benka

Nia amiko Jan Göldrich en Handlova, Slovakio, afable kompletigas nian scion pri la Esperantisto Martin Benka:

"...Jes, Benka estis konata slovaka pentristo kaj nacia artisto. Li desegnis kelkajn pm, entute 5, (Yvert 1988: Slovakia Stato n-roj 47,51, 53 (popolaj motivoj) Yvert CS 2018 kaj kvinan pm en la jaro 1988.

Martin Benka estis Esperantisto, membro de EK en la urbo Martin. Li desegnis plurajn bildkartojn je la temo *ESPERANTO*, grandan serion pri "slovakaj popolkantoj", tradukitaj en E. En la E-movado (de CS)la fakto mem, ke Martin Benka estas Esperantisto, rolis tre pozitive..."

Sinceran dankon pro la senditaj informoj!

# GLUMARKOJ

## 29-a Hungarlanda Fervojista Esperanto-Renkontiĝo, Pecs




03 - 04 juli 1993, verda sur blanka gumita papero.
Bildo: Televida turo de Pecs kaj lokomotivo, tondita diversmezure.
Ekzistas ankaŭ kun unu dika kaj 2 maldikaj oraj linioj.




Samtema,

sed ronde tondita diversmezure,
Bildo: samtema E-sta, verda sur blanka gumita papero. Ekzistas ankaŭ verda preso sur verda gumita papero
Ambaŭ ricevitaj de Fekete, dankon!!

## Klarigoj pri la glm de la SAT-Amikara Kongreso en Herouville-St.Clair




En "SAT-AMIKARO", n-ro 476, ni povas legi: "...Modelo de la glm por la 48-a SAT-Amikara Kongreso estas ellaborita de "Amikeca Asocio de Pentristoj kaj Skulptistoj de urbo Herouville-Saint Claire". S-ro Koci, pentristo, kiu kreis la bildon, prezentas jene sian artaĵon: La granda litero "E", kiel komenciĝas la vortoj: Ek, Espero, Europo, en iom oblikva formo , kun la vorto "Esperanto" interne, havas la celon, nepre kroĉi la rigardon de senatenta pasanto- Por prezenti la urbon, mi elektis la akvoturon...apude staras la domoj de la urbo...La stelaro de la Eŭropa Konsilio memorigas pri la graveco de tiu kongreso. Espero renaskiĝis...Esperanto pli kaj pli partoprenas en tiu grava konstruo...jen kion mi volis esprimi per la grafiko."

## Reeldono de Jensen 722

Okaze de la XXV datreveno de la Hispana Esperanto-Muzeo estis eldonita la sama folio kiel n-ro 722, sed kun la marĝena surpreso:

XXV Datreveno de la Hispana Esperanto-Muzeo.

Sub la unuopaj glm estas presita: 1968 - 1993.

Gumita papero, trapikita, ru, ve kaj blua.

Informis kaj sendis: Amouroux.

XXV Datreveno de Hispana Esperanto-Muzeo





1968 - 1993




1968 - 1993




1968 - 1993




1968 - 1993




1968 - 1993




1968 - 1993

Informoj pri ĝis nun ne katalogitaj glm.

Mi prezentas ĉi-tie kelkajn glm, kiuj ankoraŭ mankas en nia katalogo, Ili provizore ricevis numerojn kun aldona "a", "b" ktp. Ĉe la plej multaj ĝis nun mankas detalaj informoj:

779a 43-a Itala E.-Kongreso, Pisa (I), 1972

974a 12-a Amikeco-Kongreso, Egmond aan Zee (NL), 1-7 Sept. 1982

1003a 39-a SAT-Amikaro-Kongreso, Draguignan (F?), 21-a ĝis 26-a de aprilo 1984 (malbona bildo jam en LVL 13(92))

1127a 130-a naskiĝtago de L.L. Zamenhof, Budapest (H), 15 12 1989

91/03a Landa Fervojista Esperantista Renkontiĝo, Györ (H). 06 - 07 07 1991

91/08a Intern. kunv. de Esperantistoj kun Papo Johano Paulo II. en Rzeŝovo (PL), 02 06 1991

91/08b Monda Kunveno de Junularo kun Papo Johano Paulo II. en Ĉenstoňovo(PL(), 15 08 1991

91/14 III-a verda ŝak-olimpiko. Podebrady (CS), 1991

779a







974a




1003a




1127a




91/03a

91/14










91/08a 91/08b

glumarkoj por kongresoj en 1994 kaj 1995, eldonitaj 1993




01/94 VIZITU KOREION 1994, multkolora, en la mezo viro kun timbalo (?), ronda en 2 grandecoj: 33 Ø kaj 54 Ø.




02/94 79a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO ronde ĉirkaŭ la meza parto de la flago de Koreio, supre en la ruĝa parto la verda stelo kaj en la blua parto: SEULO 1994 kaj turo. Multkolora sur blanka gumita papero, ronda en 2 grandecoj: 33 Ø kaj 54 Ø




01/95 80A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. 22. - 29.7.1995, Tampere, Finnlando.
Blua kaj verda preso sur blanka, gumita papero, rektangula: 50x39.

*ankoraŭfoje*

## LASTMINUTE...






Jen nun bildo de tiu nebuloza stampo de Bulgario. Temas pri la 66a Esperanto Kongreso de SAT en Kazanlak, 14.-21. 8 1993.

## RECO-ETIKEDOJ

| R | Strážnice<br>202 |
|---|---|

*Nova Reko-Etikedo*

"KOMUNA KONGRESO DE CEA-GEA 28-31.5.93" tekstas tiu nova Reko-Etikedo Uzis ĝin la poŝtoficejo de Straznice. Unua tago de uzo: 3a maj 1993 ĝis elĉerpiĝo de la eldonkvanto de dekmil ekzempleroj.
Dankon pro la informo kaj originalo al nia Hasala




Reko-etikedo de la komuna kongreso de ĈEA-GEA sur poŝtkarto.

# FANTAZIAĴOJ



*"Libera Teritorio (L.T.): Insulo de rozoj.*

En nia kompleta katalogo de E-filatelio de ELF-AREK troviĝas la markoj de tiu teritorio sub *"FANTAZIAJOJ"*. Nia Gimelli nun sendis kopiojn kaj itallingvajn gazetartikolojn pri ĉi-tiu temo. La gazetartikolojn mi ne povas utiligi , temas pri la historio de tiu Teritorio, sed jam ni iam skribis pri tiu afero. Tamen mi povas resumi al vi jenajn eksciojn:


1-a eldono: 9-a juni 1968, nominalo 30 MILLS
numerigitaj folioj kun po 10 markoj.
UTK kun stampo: L.T. INSULO DE LA ROSOJ
VERDA HAVENO POŜTO

2-a eldono: 9-a julio 1968, unua eldono kun dika surstampaĵo trans la tuta folio: *Milita itala okupado.*
"UTK-stampo" kun aldona suba teksto:
*"Milita itala okupado"*

3-a eldono: 9-a septembro 1968, unua eldono kun surstampaĵo sur ĉiu marko: *"Milita Itala okupado"*
Ekzistas ankaŭ "UTK".

Tion pri la "unua eldono" kun ĝiaj "variaĵoj". Aperis tamen ankaŭ "dua eldono en la jaro 1969, numerigitaj folioj kun po 10 markoj. La bildo montras eksplodantan insulon kaj la tekston sur la markoj:

*POŜTO ESPERANTA RESPUBLIKO INSULO ROZOJ*
Nominalo: 30, 60 kaj 120 MILOJ










Rimarkinde estas, ke la teksto ŝanĝiĝis de *"LIBERA TERITROIO"* al : *"ESPERANTA RESPUBLIKO"*. Aldone: la "nacia flago", kiu montras rozon sur oranĝa fono...

En iuj landoj oni nomas tiujn markojn: *"CINDERELLA CORNERS"*. Ekzistas filatelistoj, kiuj kolektas tiujn markojn kaj ekzistas specialaj katalogoj pri tiuj nepoŝtaj markoj. Certe estas mia devo, transdoni la scion pri tiaj aperaĵoj al vi, kiuj kolektas Esperantaĵojn, ĉar ili nepre estas tiuj. Eble ni ekscios ion pli pri·la "dua eldono", ĉu aperis "UTK"?

Mi devas konfesi, ke en mia "pormovada" E-kolektaĵo, ekspoziciebla, mi ankaŭ enprenis tiujn nepoŝtajn "fantaziajn" markojn. Bedaŭrinde mankas ege multaj, hodiaŭ ne plu troveblaj, ekz.: ATLANTIS.

Tamen ja eblas en "pormovada" E-kolektaĵo ankaŭ montri kopiojn. Neniu filatelista juĝisto havas kaŭzon protesti: nek pro la kopioj, nek pro nefilatela materialo. Rimarko de Hirsch: Tamen mi opinias, ke oni rimarkas tion ĉe la disdono de puentoj pro la medaloj.

Fine mi danku al nia Gimelli pro la alsendo de la kopioj pri la "unua eldono". Aldoni mi ankaŭ devas, ke la "duan eldonon" mi trovis en la glm-kolekto de nia karmemora Lindström.

***<u>Ĉu japana tutaĵo kun privata alpreso??</u>***

**TUTAĴOJ**

Mi akiris la sube montritan TUT-PK. Kiu povas doni pliajn informojn? Kion signifas la ciferaj grupoj ja la maldekstra parto? La dato en la stampo ne estas legebla, ĉu 1986? Mi petas la japanajn kolektamikojn pri klarigo de tiu afero.

Hirsch


# *Feliĉan Novjaron !!*

Komence de la II-a jarcento de Esperanto,
Ni. ĉiuj esperantistoj, kune antaŭen-marŝu,
Al la nova etapo de Esperanto-movado !

<u>Atenton!</u>
La sekretariejo de nia Ligo translokiĝis jene;

KANTÔ-ESPERANTO-RENMEI(Ligo)
Hinode-ĉô 27-3-1026, Adaĉi-ku, Tôkyô 120, JAPAN
Tel.(03)882-2660, Poŝtoĝirkonto: Tôkyô 2-100201.

(ご注意) 連盟事務局が下記に移転しました.
〒120 東京都足立区日の出町27-3-1026 関東エス
☎ (03) 882-2660, 郵便振替：東京2 -



*Protokolo pri la kunsido de ELF-AREK dum la UK en Valencio*

La kunsido okazis dimanĉe la 25 07 1993 je la 17.00 ĝis 18.45 h en la dua kongresejo, iom for de la ĉefa kongresejo. Nek la loko, sen iuj indikoj pri la E-kongreso, nek la tempo taŭgis por tiu kunsido. Tial nur kunvenis 19 gesamideanoj, inter ili 5 ELF-AREK'anoj. Komisiite de la prezidanto, s-ro Ivar Paulsson, niaj anoj Koseniak kaj Hirsch gvidis la kunvenon, kiu daŭris ankoraŭ ne 1 horon. Poste estis tempo por la inter-ŝanĝado.

Unue ni transdonis la salutojn de s-ro Paulsson. Interkonsente kun s-ro Paulsson ni faris la proponon, ke ek de 1994 validu la iom plialtigita kotizo de DM 26,-- (13 IRK). Ĉar 5 membroj ne povis decidi pri tiu propono, ni tamen esperas, ke niaj gemembroj ne protestos, se ni enkondukas tiun plialtigitan kotizon.

Hirsch donis ankoraŭ kelkajn mallongajn informojn:

la kataloga suplemento 1994 aperos malfrue dum printempo 1994.

la venonta LVL (15(94) aperos fine de septembro.

ni devis konstati, ke la uzo de specialaj poŝtaj stampoj dum la lastaj du-tri jaroj estis tre magra. Iam ni publikigos sta-tistikon en iu el la venontaj LVL.

Fine ni petas la prezidanton, ke li ĉe la mendo de ejo por nia kunsido por la venontaj UK'oj, petu UEA pri pli taŭga ejo kaj tempo.

*ATENTIGO ATENTIGO ATENTIGO ATENTIGO*

Kaŭze de la afrankaltigoj en Germanujo ankaŭ ŝanĝis la kondiĉoj por la IRK. Po peco oni nun pagas DM 2,50 kaj povas reŝanĝi ilin je DM 2,--. Tial ni nun ankaŭ devas ŝanĝi la valoron de IRK por niaj valorpuentoj. Bv. korektu tiun de DM 1,65 al DM 2,--.

*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>*>

Informilo de ELF-AREK
Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj
*Offizielles Organ der ArGe Esperanto i. BdPh e.V.*

*Redakcio ĉe:* *Rudolf Burmeister, Max-Müller-Str.62 D-09123 Chemnitz*
*Prezidanto:* *Ivar Paulsson, Skytteholmsvägen 29 S-17144 Solna*
*Kasisto:* *Rolf Beau, Jacobstr. 9 D-04105 Leipzig*
*Banko:* Sparkasse Leipzig, Konto-No: 309 022 320 Bankkodnr(BLZ): 860 555 92
*Kotizo ek de 1994: DM 26,-- /13 IRK*
*Stampobanko:* *Werner Heimlich, Fröbelstr. 4 D-29614 Soltau*
*Kompostis+ ekspedis* *Richard Hirsch, Lambertstr. 12 D-36251 Bad Hersfeld*
*Presado:* *Albert Oesterle, Hubertusstr. 28 D-85650 Wemding*

**"Vizitu Koreion 1994" estos monda festivalo**

